

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., Box 1129, El Cerrito, CA 94530 USA.
Telephone (415) 653-0998. Editor: Catherine L. Schulze. Graphics: Wm. R. Harmon. Includes promotional
section in English and informational section in Esperanto for ELNA members. ISSN 0030-5065. Vol. 15, No. 4
July-August 1979



Not all work!

Dr. David K. Jordan and Jonathan Cole, teachers
of the Esperanto courses at San Francisco State
University in a moment of relaxation

(photo - Dickerman)

Per Zamenkopter' veturante,
per Zamenŝnurego ŝnurante,
per Zamenpafil',
kaj en Zamenmobil'
ili ĉasas la bestojn spurante.

Ignorante eksterajn konsilojn,
uzante la fortajn pupilojn
de Zamenokuloj,
en ĉiuj anguloj
ili serĉas la fikrokodilojn.

el *La Verda Kometo*
D. K. Zamenhom' 1979-jul-8

(ne nur kursoj sed limerik-konKURSOJ
ĉe San Francisco State U!)

INSIDE

Highlights of Esperanto Conventions:
Lucerne, Locarno, San Francisco

The ability to communicate through language is a miracle of Human achievement. "Some say that Esperanto is not a language. If it is not a language, Esperantists succeed in mutual understanding without a language - an even greater miracle!"

-Humphrey Tonkin, Lucerne, 1979

AN UPDATE ON ESPERANTO

By Humphrey Tonkin, President, UEA

A new working group on Esperanto at the United Nations has recently been established in New York. The group, consisting of some 15 to 20 speakers and supporters of Esperanto in the New York area, including Guido Bertucci and Rochelle Grossman of the UN staff, began working with me last November.

Its main inspiration is a proposal made by Ralph Harry, former Australian Ambassador to the UN in a speech to the International Studies Association in 1977. The proposal calls for the stage-by-stage adoption of Esperanto in the United Nations, first as a language of documentation and ultimately for interpretation services.

...On May 7 the group hosted a luncheon for the Norwegian Ambassador to the UN, Mr. Algård, on the occasion of a visit to New York by the Vice-President of UEA, Professor Carl Stöp-Bowitz.

...On May 12, the group organized a seminar in Philadelphia, for Esperanto speakers from the Middle-Atlantic states bringing together 23 Esperanto-speakers from Washington, Baltimore, New York, and Philadelphia. Guest speaker was Petr Todorov, Vice-President of the Bulgarian Esperanto Association.

...Mark Starr continues as an active member of the assembly of non-governmental organizations attached to the UN. UEA has recently joined the Conference of Non-governmental Organizations in Consultative Status with the United Nations Economic and Social Council. The Conference is active in both Geneva (where UEA has representation) and New York.

Betty Manson, ELNA member, is secretary of the UN working group and Frank Thomas is responsible for contacts with the Esperanto press.

Progress notes in brief

...Organization of American States and the Universal Esperanto Association have agreed formally to establish General Cooperative Relations.

...In March, 1979, the founding of the Association of Soviet Esperanto-Speakers brought the USSR into the world Esperanto movement.

...In April two courses in Esperanto opened in Peking. ...With the acceptance of national Esperanto associations in Venezuela, Mexico, Brazil and Malta, the Universal Esperanto Association's affiliates reached forty.

...Enrollment in Esperanto courses at the University of Tehran reached 2,000 students last year. A sizeable delegation from Iran participated in the Universal Esperanto Congress in Lucerne this summer.

ESPERANTO STUDIES ASSOCIATION OF AMERICA — Excerpts from Bulletin #6

Interlinguistics Session at Modern Language Association Convention, San Francisco, December 1979.

"European Schemes for a Universal Language: Their Origins, Development, and Decline" will be the topic of a special session chaired by Prof. Humphrey Tonkin. Speakers will be Ann Cline Kelley (Howard University), Paul J. Klemp (Univ. of Toronto), Hugh Ormsby-Lennon (Northwestern Univ.), and Gerhard F. Strasser (Pennsylvania State Univ.). Further sessions and an Esperanto Information Booth are being planned.

"The Right to Communicate" was the subject of a symposium of NGO's at UNESCO, Paris. The result of a resolution presented at the Conference of NGO's two years ago by UEA, the symposium included a session on language featuring speeches by Claude Piron, University of Geneva, and Jean-Louis Calvet, University of Paris.

SWITZERLAND - A major exhibition at the National Library in Berne, entitled "Esperanto and Interlinguistics in Switzerland" has attracted a great deal of attention. Notable for its outstanding graphic presentation, the exhibit will travel among major Swiss libraries after three months in Berne.

CHILE - Esperanto is now being taught in the Education Faculty at the University of Chile in Santiago.

FRANCE - A third-level course in Esperanto has recently been established at the University of Clermont-Ferrand, where Esperanto courses were first established in 1969. The program now extends over three years. In the first year students acquire a basic knowledge of the language; in the second they complete their study of the language and begin work on Esperanto studies. The third year is devoted to study of Esperanto literature. In 1978, 33 were successful in examinations. As in Aix-en-Provence, the other French university in which Esperanto is taught, the language can be elected as part of the national degree examinations. Professor of English Pierre Janton teaches the courses in Esperanto at Clermont-Ferrand.

CHINA - There are numerous signs of emergence of interest in Esperanto in China after some fifteen years of relative silence. Two new Esperanto courses have recently opened in Peking - at the Language Institute and at the University of Peking. A recent issue of its monthly magazine *EL POPOLA ĈINIO*, one of the best-edited of all periodicals currently appearing in Esperanto, included two long articles, with abundant color illustrations, on the tourist attractions of ... Taiwan.

The July issue of *EL POPOLA ĈINIO* included an article about *Armand Su*, the talented Esperantist poet who was incarcerated for several years. He is receiving some attention in the Chinese news media and in April a collection of his poetry in Italian was reported in Venice.

NETHERLANDS - Students and scientists at the Technical University of Delft have recently formed a study group on Esperanto and its potential for machine translation. *THD NIEWS*, the University's journal, has published several articles on Esperanto and language problems.

CZECHOSLOVAKIA - Some sixty scientists attended a seminar in Zilina organized around the theme "The Application of Esperanto in Science and Technology." Nine of the twenty papers presented dealt with aspects of the use of Esperanto in science.

GERMANY - (Federal Republic) - The Third Working Conference on Interlinguistics at Paderborn was concerned principally with the teaching of Esperanto in elementary schools and included analysis of recently collected data on the influence of Esperanto instruction on pupils' progress in other subjects.

SWITZERLAND - The Second International Esperantology Conference organized by the Center for Research on World Language Problems, took place during the 64th World Congress of Esperanto in Lucerne (July 31 - August 3). Among featured speakers were Marinko Gjivoje (Yugoslavia); Claude Gacond (Switzerland); Francois Lo Giacomo (France) and Detlev Blanke (E. Germany).

[Editor's Note: The above report was compiled mostly by Prof. Humphrey Tonkin (Univ. of Pennsylvania), newly elected President of ESAA. Other officers include: Prof. Richard Wood (S.E. Missouri State Univ.), Vice-President; Prof. Pierre Ullman (Univ. of Wisconsin-Milwaukee), Secretary-Treasurer. Directors: Dr. E. J. Lieberman (Esperantic Studies Foundation, Washington DC); Prof. Jonathan Pool (Univ. of Washington); Gizella G. Edwards (Center for Exceptional Child Education, Hillsborough Public Schools, Florida); Dr. William Solzbacher (formerly of Voice of America, Washington DC); Prof. Dennis Q. McInerney (Bradley Univ.); and Prof. Bruce A. Sherwood (Univ. of Illinois).]

**RAPORTO DE LA 27A KONGRESO DE ELNA
ĈE SAN FRANCISCO STATE UNIVERSITY – 13-17an JULIO, 1979**

[*Note from the president: This report, as has been the custom in the past, will be made in Esperanto. I have heard complaints from time to time that publishing reports in Esperanto does not afford an opportunity to those just beginning to learn the International Language to understand what is taking place in the League. It seems to me that the official transactions of the League should properly be in Esperanto, except where the law requires otherwise. Every Esperantist was once a "beginner" – and doubtless had to do what I am here suggesting; look upon this report as an exercise in translation and, when you have finished it, you may possibly understand it even better than those fluent in Esperanto who read it quickly. Ĉu ne??*]

La 27a kongreso de la Esperanto League for North America, Inc., komencis je 13a julio, 1979, ĉe Verducci Hall en San Francisco State University, San Francisco, Kalifornio, per la kutima interkonatiga vespero - kiel kutime gaja, babiloplena, interkonatiga, kaj ĝuebla por ĉiuj.

La oficiala malfermo de la Kongreso okazis en la mateno de 14a julio, kun vicprezidanto Ken Thomson en la prezida seĝo pro neevitebla foresto de prezidanto Harmon tiun tagon. Sekvas raporto de la oficialaj decidoj de la 27a Kongreso de ELNA, ĉiuj faritaj post plena diskutado inter la kongresanoj:

- **KOTIZOJ:** Decidis plialtigi la kotizojn en ĉiuj kategorioj krom junula kaj studenta al la sekvantaj: Individua membreco - \$18.00; Familia membreco - \$27.00; Emeritula membreco - \$10.00; Dumviva membreco - \$360. La novaj kotizoj efektiviĝos por 1980. Noto: Dumvivaj membrecoj ricevitaj en la Centra Oficejo antaŭ ol 31a decembro, 1979, estos akceptitaj je la malnova kotizo de \$300.

- **BUDĜETO:** Akceptis la proponitan budĝeton, kaj rajtigis la prezidanton kaj kasiston elspezi ĝis la limoj fiksitaj sen aparta aprobo de la Estraro. Iuj elspezoj preter la budĝetita sumo dmvos esti antaŭe aprobitaj de la Estraro. [Noto: Vidu la budĝeton kontraŭflanke de ĉi tiu paĝo.]

- **OAS:** Aprobis proponon sendi salutleteron al la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj en Vaŝingtono, pro la lastatempa akcepto de kunlabora rilato kun UEA, kaj agnoskante la bonajn laborojn de D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, kaj Affonso Correa, membro de ELNA, tiurilate.

- **BROŝURO VERKITA DE D-RO MARIO PEI:** La Kongreso reasertis subtenon de la pasintjara propono, ke ELNA reeldonu aŭ reeldonigu la broŝuron *Public Affairs Pamphlet* verkita de D-ro Mario Pei kaj nun elĉerpita. [Noto de la prezidanto: Jam nun la CO komunikas kun la koncerna organizo en Novjorko tiurilate.]

- **INFORMKOMITATO:** Propono de Frank Helmuth, ke ELNA starigu informkomitaton por direkti la aperigon de projektoj kaj informiloj, kaj por ĝenerale plibonigi la informadon tra la lando, estis akceptita. [Noto de la prezidanto: Mi poste nomis Frank Helmuth estri ĉi tiun novan komitaton.]

- **AGOJ DE ESTRARO KAJ PREZIDANTO:** La Kongreso ratifis la agojn dum la pasinta jaro de la Estraro kaj la prezidanto. (Raporto pri tiuj agoj troveblas en la diversaj eldonoj de *ELNA Newsletter*.)

- **SPECIALAJ KURSOJ EN NOVJORKO:** Post raporto de D-ro Julius Manson pri la ebleco starigi specialan kursaron en Novjorko, gvidota de John Lewine, por subteni la ekkreskantan agadon en U.N. kaj allogi instruistojn, la Kongreso aprobis proponon, ke ELNA kiel eble helpu la kreon kaj subtenadon de tiu kursaro, starigante specialan donac-fonduson tiucele. Post aprobo, la nova fonduso estis nomita "Fonduso Pomega" (pro la bone konata kromnomo de la urbego Novjorko, "La Granda Pomo") kaj dum la Kongreso donacoj sumante pli ol \$550 enfluis. [Noto: Aparta klarigo pri ĉi tiu afero aperos en estonta eldono de *ELNA Newsletter*.]

- **SALUTO AL LABORANTOJ POR ESPERANTO:** Propono de la Rezolucia Komitato, ke la Kongreso oficiale agnoski kaj danki profunde al tiuj, kiuj laboris dum la pasinta jaro por Esperanto, estis aprobita. La konkludo de la rezolucio estis, ke tiuj laborantoj prosperu en sia senlaca laboro estonteca.

- **SALUTO AL AL KAJ SARA ANN ESTLING:** La Kongreso per aplaŭdo aprobis sendi apartan saluton al Al kaj Sara Ann Estling kun gratuloj pro sukcesa resaniĝo kaj espero, ke ili feliĉe laboros por Esperanto dum la venonta jaro.

- **OLIMPIAJ LUDOJ EN LOS ANGELES:** Propono aprobita: Ke ELNA principe planu starigi komitaton por trakti la agadon ĉe la Olimpiaj Ludoj okazontaj en Los Angeles, CA en 1984.

- **DANKOJN AL DOROTHY JONES:** Per aplaŭdo la Kongreso esprimis profundan dankon al Dorothy Jones pro la senĉesa kaj efika laborado kiel Kasisto de ELNA. (Post jaroj da laboro en tiu posteno, Dorothy elektis ne rekandidatiĝi en 1979.)

- **SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ ĈE SAN FRANCISCO STATE:** La Kongreso aprobis la sekvantan kvaroblan proponon: (1) ke okaze de la 10a datreveno de someraj Esperanto-kursoj ĉe SFSU, la Kongreso kaj ELNA agnosku la gravecon de tiu kursaro por la Esperanto-movado en Usono; (2) ke ELNA kaj la Kongreso esprimu profundan dankon al Cathy Schulze, kiu antaŭ pli ol dek jaroj ekklopodis enkonduki Esperanton oficiale en la kursaron de la universitato kaj kiu depost tiu tempo ĉiujare daŭrigas siajn klopodojn certigi la sukceson kaj plibonigi la kvaliton de la kursoj; (3) ke ELNA kaj la Kongreso plue esprimu dankon al D-ro Richard L. Trapp kiu dum jaroj favoris kaj preparolas la daŭrigon de Esperanto-kursoj ĉe la universitataj instancoj; (4) ke ELNA, la lokaj kluboj, kaj ĉiu unuopa Esperantisto konsci, ke la venonta somero estos kriza rilate la daŭrigon de la kursoj, kaj ke ili strebu subteni kaj subvencii la kursojn por ebligi kiom eble plej ampleksan partoprenon dum la 1980-jara somerkursaro:

- **PREZIDENTA KOMISIONO:** La Kongreso rekomendas al la "President's Committee on Foreign Languages and International Studies" la konsideron de Esperanto kiel taŭga studobjekto, kondukanta al la studo de fremdaj lingvoj kaj lingvistiko, kaj la alvokon de d-ro Robert Blair al la Komisiono por fari referaĵon pri siaj spertoj kaj eltrovaĵoj dum sia 9-jara profesia eksperimenta laboro ĉe Brigham Young University pri Esperanto kaj lingvaj studoj.

- **TRANSLOKIGO DE ELNA-ARKIVO:** Akceptis la peton de la aktuala Arkivisto de ELNA, D-ro B. J. Balcar, ke kiel eble plej frue la arkivoj de ELNA estu translokigitaj al taŭga loko, pro la fakto ke la aĝo kaj sanstato de D-ro Balcar ne plu permesos, ke li daŭre traktu la arkivon. Kun danko al D-ro Balcar pro la longa, fidebla laboro kiel arkivisto, la Kongreso akceptis, ke la arkivo estu translokigita dumtempe al la Centra Oficejo, atendante la trovon kaj nomigon de nova Arkivisto. [Noto de la prezidanto: Antaŭ ol ni lernis pri ĉi tiu bedaŭrinda perdo de la servoj de D-ro Balcar, ni estis negocintaj kun najbara okupanto de spaco en la konstruaĵo kie situas nia Centra Oficejo, por eventuala subluo de unu el la tri ĉambroj de la CO. Por certigi, ke estos taŭga loko por la arkivoj ĝis ni povos trovi novan Arkiviston, ni ĉesis tiun negacadon kaj retenos la tutan spacon. Estas sufiĉe da spaco en la CO nun por enteni la tutan arkivaĵaron facile.]

- **KONGRESLOKO POR 1980:** La Kongreso aŭskultis la inviton de Kanada Esperanto-Asocio, farita de S-ro Zacharl el Vancouver, BC, ke ELNA kune kongresu en 1980 ĉe Vancouver kun la Kanada Esperanto-Asocio kaj la 2a Transpacifika Konferenco tie okazonta. Ĉi tiu triobla kongresaro devus allogi grandan nombron da Esperantistoj ne nur el la du najbaraj Amerikaj landoj, sed ankaŭ el Azio, Aŭstralio kaj aliaj Pacifikaj landoj. [Noto de la prezidanto: Laŭ nia Statuto, ĉe la Kongreso povas veni invitoj por la sekvantaj kongresoj; tamen la Estraro devas oficiale aprobi la lokon kaj daton. La Estraro jam pritraktis ĉi tiun inviton al Vancouver, kaj unuanime aprobis. Aparta raporto pri la okazonta triobla kongresaro aperos en *ELNA Newsletter*. Planu jam nun veni!]

La Kongreso aprobis ĉiujn raportojn de la starantaj komitatoj de ELNA.

• KOMITATAJ RAPORTOJ:

La balota komitato dumkongresa raportis la rezulton de la balotado por la postenoj pritraktendaj en 1979. Elektitaj: KASISTO: Wm. Schulze. ESTRARANOJ: Karl Nell (ĝis 1980); Cornelius McKown (ĝis 1982); Douglas Swett (ĝis 1982); Janet Brugos Young (ĝis 1982).

Prezidanto Harmon nomis la sekvantajn komitatanojn kaj komisiitojn por 1980: **Aŭd-vida Komitato:** Ken VerPloeg. **Ekzamena Servo kaj Koresponda Kurso:** Dorothy Holland. **Scienca/Teknika Komitato:** R. K. Jones. **Semajno de Internacia Amikeco:** D-ro Stanley Drake. **Komitatano A ĉe UEA:** Roan O. Stone. **Vojaĝkomitato:** Janet Brugos Young kaj Lucille C. Harmon. **Statutokomisiono:** Ken Thomson. **Korporaciaj Aferoj:** Wm. W. Glenny. **Informa Komitato:** Frank Helmuth. **Olimpiaj Ludoj:** Bernice Garrett. **Redaktoro, ELNA Newsletter:** Cathy Schulze. **Financa Komitato:** Wm. Schulze kaj Wm. R. Harmon. **Komisiito por Fonduso Pomego:** D-ro Julius Manson, sub la gvido de Kasisto Wm. Schulze.

CETERAĴOJ: Dum la lasta tago de la Kongreso, vizitis tri Eŭropaj Esperantistoj: S-ro J. Wolak (Bulgario), S-ro Ryszard Bilski, F-ino Halina Szapatas (Pollando). S-ro Wolak prelegis pri la nova projekto en Bulgario, hotelo/lernejo por Esperantistoj, en la Rodopi-montaro kaj projektata nova hotelo/lernejo en Varna. S-ro Wolak substrekis la malgrandan koston de restado ĉe tiuj lokoj, kaj petis la subtenon de Usonaj Esperantistoj per restado tie. Pli da informo pri ĉi tio aperos estontece.

Ĉe la bankedo sabaton, 14a julio, ĉiuj ĝuis la estoson, la manĝaĵojn, kaj speciale la prelegojn dumbankedajn. S-ro T. Yuri, honora gasto el Ashiya, Japanujo, donis interesoplenan, emocian paroladon pri pasintaj spertoj kiel Esperantisto. Ken Thomson almetis poste sian specialan specon de humuro, karamboloj, vortskualoj, frazotordaĵoj, ktp. D-ro Blair raportis pri sia nova edukmetodo kaj kaptis la atenton de ĉiuj. Kantis bele nia propra kantobirdo, Alberta Casey, kiu poste kantis ĉe la Universala Kongreso en Lucerno. La ĉemara loko kronis la okazon.

Ĉe la fermiĝo de la Kongreso posttagmeze la 17an, prezidanto Harmon raportis, ke la kongreso verŝajne profitos proksimume je \$1000, kiu multe helpos la financon staton de la Ligo. La premioj en la "loterio" estis gajnitaj de: Martha Walker, Mary Hamersmith, Paula Taylor, kaj Audra Anderson.

**BUDĜETO APROBITA DE LA 27A KONGRESO DE ELNA
SAN FRANCISCO, CALIFORNIA - POR FISKA JARO 1979-80**

BUDĜETERO	BUD. 79-80	JARO 78-79	JARO 77-78
E N S P E Z O J:			
Kotizoj	9150	8033	7469
Rentoj	2000	2095	1529
Donacoj	3000	3860	13037
Kongresprofito	500	769	89
Vendoj de Libroservo	22000	22084	19414
Abonprofitoj	200	--	97
Poŝtokosta enspezo	1500	1552	762
Reklamoj kaj diversaj	75	10	55
SUMO DE ENSPEZOJ:	\$38425	\$38403	\$42452
E L S P E Z O J:			
Administraj kostoj	500	345	376
Lukontrakto	2250	2250	2250
Luadaj kromkostoj	1000	986	625
Salajroj kaj kromaĵoj	11000	10636	9452
Telefono	250	223	157
Asekuroj	950	1078	1460
Oficejaj provizoj	500	933	963
Preskostoj	3200	2827	2012
Poŝto	2750	2592	1800
Leĝaj kostoj	225	235	175
Materialo por membroj	1000	707	1509
UEA kotizoj	175	225	224
Membrecoj inkl. UN	125	100	100
Aĉeto de libroj ktp	12000	18194	10915
Diversaj (inkl. al kapitalo)	2500	--	--
SUMO DE ELSPEZOJ:	\$38425	41331	32018

Laŭ la aprobita rezolucio de la Kongreso 1979a, la Prezidanto kaj Kasisto estas rajtigataj elspezi ene de la aprobita budĝeto, sed elspezo preter la indikitaj limoj devas esti rajtigataj de la Estraro. Post sesmonata kontrolo en frua 1980, se necese la Prezidanto kaj Kasisto proponos reverkon kun la aprobo de la Estraro.

Second International Conference on Language Problems in Science

Marilia, Brazil

The Second International Conference on Language Problems in Science took place April 13-18, 1979, as one of the events held to celebrate the 50th anniversary of the city of Marilia, Brazil, which along with the Ministry of Education and Culture of the state of São Paulo sponsored the meeting. An unusual aspect of the conference was that the working language was Esperanto, making this the first such conference sponsored by non-Esperantist organizations since before the Second World War. The participating scientists came from West Europe, South America (especially Brazil), Japan, and the United States.

Studies of languages used in chemistry (Sinitiro Kawamura, Japan, and Alberto Barrocas, Uruguay) and in seed pathology (Paul Neergaard, Denmark) showed that English is used for about 60% of articles published in these fields, with the other 40% being mainly in Russian, German, French, and Japanese. A formal resolution of the conference, based on such data, points out that learning to read just one foreign language is not adequate for most scientific work, and calls for multi-language reading courses for science students. The resolution also suggests that a preparatory course in Esperanto could be of major benefit in providing a sound linguistic base for comparative studies of the major publication languages.

Several papers emphasized that widespread use of *written* English has not solved the problem of *spoken* communication among scientists. Symptoms mentioned included the tendency for national groups to keep to themselves at conferences, the enforced inactivity of Russian members in many working committees, and the extreme difficulty Japanese scientists have with spoken English (unless they have spent considerable time in an English-speaking country). Paul Neergaard demonstrated that the impact of his Danish laboratory on the growth of university courses and testing stations in foreign countries has been severely conditioned by language problems. For example, there has been much more growth in anglophone Africa than in francophone Africa, due to language biases in the selection and success of students who come to Denmark.

Several speakers pointed out that scientific literature produced in developing countries often is neglected. A conference resolution urged these countries to make sure their journals are sent promptly to abstracting services.

While problems of written and spoken communication in international science dominated the discussions, there were also talks on related matters, such as computational aspects of Esperanto (machine translation, Heinz-Dieter Maas, Germany, and Geraldo Mattos, Brazil; speech synthesis, Bruce Sherwood, USA; and speech recognition, Marie-Thérèse Mas, France) and pedagogical aspects of the teaching of Esperanto as a preparatory course for the study of national languages (Helmar Frank, Germany).

Taking note of the egalitarian, efficient, and accurate nature of all forms of discussion at this conference, a final resolution expressed the participants' conviction that Esperanto offers a definitive and truly international solution to language problems in science.

Bruce Arne Sherwood

LANGUAGE IN THE NEWS

How's that again? "Bank implores bandits to be patient. The largest Puerto Rican bank in New York has begun putting up signs in its windows asking would-be bandits to "please be patient" when announcing a stickup.

The reason? The banks' tellers "may need an interpreter."

"A spokesman for the Banco de Ponce said yesterday that the signs are being put up in its ten branches to avoid confusion during a holdup. He said all of the tellers are bilingual, and he feels that they may revert to speaking Spanish in a shocking situation such as a robbery."

(*San Francisco Chronicle*, Aug 24, 1979)

Asia Culture Society, Ft. Worth TX in its June *Newsletter* carried a letter by Donald Harlow of El Cerrito, CA: "June Clements in her article...writes: '...and those (Western) translations (of Chinese literature) differ broadly, depending upon individual interpretations of picture and syllable. Some particular poems are even considered 'untranslatable'. I should point out that a fair amount of Japanese and Chinese literature is available in Esperanto translation...and I have never heard of any Japanese or Chinese Esperantist complaining that some poem in his own language was untranslatable."

MULTILINGUALISM


IATA (International Association of Air Transport), an association of airlines, gets attention in the press when it raises air fares. OICA (Organization of International Civil Aviation) is a specialized affiliate of the UN. Its aim is the advancement of international understanding through the progress of civil aviation. It is occupied in securing the right to fly over, and land in; member countries. Both IATA and OICA are headquartered in Montreal.

Aviation is an inherently international activity which is constantly faced with problems of language. One-third of the OICA budget is absorbed by language services. It began in 1944 with English, french, and Spanish. Later Russian, Arabic, and Chinese were added. The multiplication of translators needed to accomplish this led to a general study of the language problem and its costs in all UN agencies and its study "REPORT ON CONSEQUENCES OF ADDITIONAL LANGUAGES IN THE U.N. SYSTEM."

(Translated from *UN KAJ NI* by Cathy Schulze)




1



2



12



11




10



ELNA CONVENTION PHOTO ALB


1. Luis Fumero, head of Foreign I (Ohio) College, leads the singir James Cool, Ralph Murphy, Sh Whitaker, Erna Harris
2. Dr. Robert Blair (Brigham Your T. Yuri (Japan) entertains.
- 3, 4. Ken Thomson, ELNA Vice Pr at business session and in li
5. Dorothy Holland, Editor, AATI ELNA Central Office, Walter K
6. Bill Harmon seems to approve Ralph Murphy (Boston) on his
7. Robert Swenson, ELNA Board Donald Harlow, addresses ELN
8. Anne Whitaker (center) of Kan Pamela Hambrook and Tirola
9. Alberta Casey entertains with Luigi Minnaja.
10. Nancy Wolter, Sacramento, w
11. Sharon Bjorkman, Allenspark, Monique Kim, Huntington Be
12. Mark Starr, Honorary Member



3



4



5



6



8



7

UM

Language Department, Wilmington
g at the banquet. (L to R: Dr.
iron Bjorkman, Fumero, Anne

g Univ.) listens attentively as

resident, assists President Harmon
fter moments acts as chief swami.

Bulteno, Donald Harlow, Director
m, Huntington Beach

as Lucy Harmon congratulates
successful bid for *Libro de Amo*.
Member, flanked by Angela and
A banqueters.

loops, BC, with her two students,
lowe.

speranto solos translated by Dr.

h Tom Hess, Victoria, BC.
CO, Ward Giannini, Columbus, OH
ch, CA.
of ELNA

(photos by Vallon-Wheeler)

NEW BOOK SERVICE OFFERINGS

□□Lorjak: *Retoj*. Broŝurita. \$12.30. 206p. Aventuro de juna franca nobelo kontraŭvole tirita en la reton de juvelŝtelista bando. Fare de la verkinto de *Neologisme* kaj *Transe*.

□□Wells: *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*. \$7.25. 76p. Broŝurita. Elstara lingvistika priskribo de la lingvo Esperanto, kompare kun diversaj aliaj lingvoj. Vidu la recenzon en la maj-jun numero de *Newsletter*.

□□Harry: *Esperanto, Internacia Lingvo de Amikeco*. Broŝurita. \$3.50. 121p. Sporta frazaro trilingva (Esperanto, angla, franca), eldonita en Kanado okaze de la Olimpiado en Montrealo.

□□Obligado: *Santos Vega*. Broŝurita. \$1.85. 49p. Konata argentina gaŭĉo-poemo, en traduko de Horacio Re.

□□Valano: *Ĉu Li Bremsis Sufiĉe?* Broŝurita. \$7.25. 128p. Dua streĉa detektiva romano pri Jano Karal, la ĉefrolanto de la konata romano *Ĉu Vi Kuiras Ĉine?* (ankaŭ havebla ĉe ni!)

□□Wüster: *Esperantologiaj Studoj*. Broŝurita. \$14.50. 254p. Aro da ĉefartikoloj pri esperantologio, interlingvistiko, kaj teknika terminologio fare de unu el la plej fruktivaj mensoj en Esperantujo.

□□Avo: *Laŭkazaj Lingvaj Notoj*. Broŝurita. \$4.75. 95p. Lumdonanta komento pri multaj el la plej malfacilaj punktoj de Esperanto. El la samnoma rubriko, kiu dum multaj jaroj aperas en *The British Esperantist*.

□□Auld: *Enkonduko en la Originalan Literaturo de Esperanto*. Broŝurita. \$7.50. 101p. Serio da prelegoj farita de William Auld, unu el la plej gravaj vivantaj Esperantistaj beletristoj, pri la historio kaj evoluo de la originala literaturo en la Internacia Lingvo, 1887-1997.

□□MacGill: *La Laŭta Vekhorloĝo*. Broŝurita. \$2.10. 32p. Simpla, ne tro serioza, tamen interesa facila legolibro por komencantoj. Enhavas ekzercojn kaj vortoliston.

□□Holzhaus: *Granda Galerio Zamenhofa II.* Bindita. \$60.00. 419p. Aro da fotoj, kaj fotostatoj pri homoj, lokoj, aĵoj, monumentoj, kaj leteroj, kiuj rilatas al Zamenhof. Necesa por entuziasmuloj.

□□--: *Krutaĵo Fluganta Aglo*. Broŝurita. \$0.55. 153p. Bildrakonto pri la kresko de klaskonscio en junulino. Ĉina.

□□Francini: *Esperanto sen Antaŭjuĝoj*. \$7.75. 208p. Broŝurita. Objektiva analizo pri la ĉefaj kritikoj kontraŭ Esperanto.

□□--: *Nederlando Koncize*. Broŝurita. \$0.25. 47p. Plena priskribo pri Nederlando, kun koloraj fotoj kaj mapoj, eldonita de la Nederlanda Eksterlanda Ministerio.

□□Boatman: *Kara Diablino*. Broŝurita. \$7.00. 112p. Nova Mistero-fantaziaĵo de malnova Esperantista verkisto.

□□Krilov: *Elektitaj Fabloj*. Broŝurita. \$12.50. 336p. Ezopecaj fabloj lerte tradukitaj verse. Ĉi tiu libro estas numero 15 en la konata UNESKO-serio *Oriento-Okcidento*.

VIA KUNLABORO ESTAS INVITATA!

Nova Novaĵletero pri Virina Agado invitas artikolojn kaj informojn al la nova NL speciale tradukojn de artikoloj kiuj interesos kaj edukos virinojn ĉie. Por specimena ekzemplero de la *Novaĵletero pri Virina Agado* sendu \$1.00 al la redaktoro: Anna Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Netherlands.

LITERATURA SUPLEMENTO

ELNA projektas eldoni ĉivintre malgrandan kajeron de verkaĵoj faritaj de usonaj Esperantistoj. La literaturaĵoj povas esti aŭ originalaj aŭ tradukaj.

Verŝajne la kajero estos samformata kiel la *Newsletter*. Ĉu ĝi enhavos kvar paĝojn, ĉu ok, ĉu eble eĉ dekdu, tio entute dependas de vi, la Esperantistoj de ELNA. Ne, ke vi devos pli multe pagi por ricevi ĉi tiun libreton - vi ja ricevos ĝin sen ekstra pago - sed ke vi devos helpi nin plenumi ĝin de viaj verkaĵoj.

Ĉion ni devos ricevi antaŭ la komenco de novembro por ebligi elsendon de la LS antaŭ fino de la jaro. Ni preferas: novelojn, versaĵojn, fragmentojn el romanoj. Longeco devas esti ne pli ol dumilvortoj. Ni rezervas al ni la rajton lingve kontroli kaj laŭnecese revizii.

Via entuziasma kunlaboro ebligas ke la *Literatura Suplemento* fariĝu ĉiujara tradicio de ELNA.

Ĉion por la *Literatura Suplemento 1979a* sendu al: Centra Oficejo de ELNA, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgaria: S-ino Marijka Siderova, Blok Montaĵ-1 Uh G, ap. 4, 5500-Loveĉ pri muziko, libroj.

China: Chang Nai Tsun, Teachers' Training College, Huhehot, Inner Mongolia.

France: Paul Duŭpayrat, 1820 route de Genève 01700 Miribel 48j, inĝeniero (pontoj kaj ŝoseoj).

East Germany: Hans Joachim Krieg, Kloster-Str 11, 49 Zeitz, DDR 32j, tek. en fabriko por beb-veturiloj.

West Germany: Eugen Kutz, Otto-Hahn Str. 9, 5630 Remscheid 11 26j, preciz-mekanisto.

Hungary: Erika Kovács, Thälmann 22/6, Budapest 1131 12j knabino.

Dobos Ferenc, EVIG E. Grupo, Jósika u. 14, Budapest H-1191 dez. speciale pk kun popolkostumoj k.s. por ekspozicio.

Italy: Myriam Colombo, Via Massaia 13, 20030 Bouisio (Milano) 23j studentino

Japan: Studentoj de S-ro Rinzo Okumura, Imagaŭa 2-ĉōme 15-7, Higaŝi-Sumijoŝi-ku, Osaka 546 Japan.

Interŝanĝo de infanbildlibroj:

S-ro Ichiro Kawamura, 5-13 Muromachi, Ikedashi, 563 Japan

S-ro Shigekazu Nishimiya, 6-21 Asahiga-oka 2-chome, Ikeda-shi 563

S-ro Sinoda Micunobu, 2-15-2 Ohobe, Kawanisi, 666 Japan

F-ino Hayasi Sigemi, Satukigaoka 3-3-30-303, Ikeda-si 563 Japan

F-ino Akiko Ikeda, 3-33-2 Naritahigasi, Suginami-ku, Tokyo - studentino

Sri Lanka: S-ro L. Goonewardena, Panapitiya, Kahawatte - intruas Esperanton

KORESPONDO PER SONBENDO nur en Nord-ameriko: Cornelius J. McKown, Apt. C-18, 445 Waupelani, State College PA 16801

FROM THE UN AND US #13

Because UN organizations rely heavily on translation to carry on their work, a 3-week strike by translators (Jan. 23 - Feb. 12) brought this giant organization to a halt.

It is significant that UNESCO, in its bulletin *ALSED* (anthropology and language) took particular note that the Esperanto Convention at Varna, Bulgaria brought together 4,000 people from over 40 countries for a week of activities without translators.

LOKAJ KLUBOJ

Esperanto Society of Chicago en junia numero de *SALUTON* raportis vizitojn de Bob Turner kaj Bill Cassie de Projektoj-Internaciaj-Kompanio kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto pro sia laboro kun edukado, sano, kaj agrikulturo en evolulandoj.

Al la maja kunveno de ESC venis Dan Torres de Klubaro Lions kaj Jack Giles de Klubaro Rotary kiuj parolis pri la lingvaj baroj kiujn frontas iliaj respektivaj internaciaj organizoj. Ekzemple, ĉe la lasta kongreso de Rotary en Japanujo partoprenis 30,000 Japanoj kaj 10,000 personoj el 100 aliaj landoj. Rotary eldonas 200 presaĵojn kaj dokumentojn en 10 lingvoj sed kapablas korespondi nur en angla, franca, kaj germana lingvoj. Krome kongresanoj rajtas alparoli la kongreson nur en la 3 aŭ 4 lingvoj por kiuj interpretistoj haveblas. (raportas R. Kent Jones)

Esperanto Society of Florida raportas pri elekto de novaj postenoj: Prezidanto, D-ro Douglas Swett; Vic-Prez., Armand Coigne; Ĝenerala Sekr., Mark Weddell; Kasisto, Virginia Toffaletti. D-ro Swett estas ankaŭ nova membro de la ELNA-Estraro.

Esperanto Society of Washington, DC renkontiĝas ĉe Aurora Hills Recreation Center in Arlington VA. La nova prezidanto, Affonso Correa, planas kun membroj por ekspansio de agadoj. Lastatempa vizitanto estis C. S. Beckford el Sudafriko. Sergio Docal raportis pri sia vizito al la ĝuinda Hispana Esperanto-Kongreso antaŭ la UK en Lucerno.

Esperanto Society of San Francisco (SFERO) gastigis Richard kaj Jeanne-Marie Cash kaj filoj Jerome kaj Frederic el Les Essarts-leRoi, France. Ges-roj Cash kunordigas la Esperanto-gasto-servon PAS-PORTO kaj priskribis tiun servon en akcepto ĉe la hejmo de Mary Catherine Sears en Palo Alto.

VANCOUVER

Brita Kolumbio

INVITAS VIN POR LA

2a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

26a - 29a de Julio, 1980

ĉe la Universitato de Brita Kolumbio

PRI LA KONGRESURBO VANCOUVER

Jen, de spertaj mondvojaĝantoj laŭdata kiel unu el la plej bele situitaj urboj de la mondo, Vancouver, nia kongresurbo por la 2a Pacifika Kongreso.

Loĝantoj: 400.000, sen kalkulo de antaŭurboj. Kun antaŭurboj: 1,000.000. Ĉu oni povas imagi pli taŭgan lokon ol Vancouver por internacia kongreso, pro ĝia multetnika, kosmopolita etoso?

Kuŝanta apud maro kaj montoj, kun plaĝoj multajn mejlojn etendantaj, ĝi havas ĉion serĉatan de vojaĝanto dorlotita.

Tie troviĝas Stanley Parko, laŭdire unu el la plej grandaj urboparkoj de la mondo, sed -- pli grave! -- certe unu el la plej belaj. Ĝi enhavas kvarcent hektarojn da arbaro, krom pluraj lagoj kun abundo da naĝbirdoj kiel cignoj, sovaĝaj anseroj, anasoj, ktp. Sciuroj prenas nuksojn el via mano. Bonsance ursoj liberaj ne troviĝas en la parko, ĉar kun tiuj kiu sentus sin komforta? Sed en la parka bestĝardeno oni povas rigardi polusajn ursojn en sekureco... Same ankaŭ delfenojn kaj diversajn balenojn dresitajn. Aŭ se plaĉas al vi golfludi, tenisludi, naĝi, longdistanckuri, amumi, aŭ nur ripozi, vi tion faru en Stanley Parko.

Ĝuste apud la urbo, en la nordo, komenciĝas la montoj, ofte neĝokovritaj ĝis fino de somero. Prenu telferon (kablotramon) al la pinto de Grouse Monto (1.250 metroj), aŭ aŭtobusu supren al Seymour Monto aŭ Simon Fraser Universitato por ĝui panoraman rigardon multajn mejlojn etendan. En la monta regiono vi eble bonŝancos vidi diversajn sovaĝajn bestojn, jes, eĉ ursojn.

LA KONGRESLOKO: UNIVERSITATO DE BRITA KOLUMBIO

Estante urbeto mem en alloga ĉirkaŭaĵo, la Universitato de Brita Kolumbio estos loko de ĉiuj aktivoj lige al la Kongreso, escepte de ekskursoj. Ĉar ĝi enhavas i.a. famkonatan antropologian muzeon kaj japaneskan ĝardenon, ĝi mem sola taŭgus por almenaŭ unu tago da esplorado.

GRAVA NOTO: LA 1980a ELNA-KONGRESO OKAZOS EN LA KADRO DE LA 2a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO EN VANCOUVER. KOMENCU PLANI VIAN SOMERON NUN!

KOREKTOJ POR LA ADRESARO

Bonvolu fari la jenajn ŝanĝojn en la
ELNA-Adresaro 1979.

Please make the following changes in
the ELNA Address List 1979.

- Kovrilo: Bv aldoni la telefonnumeron de la Centra Oficejo:
(415) 653-0998
- Paĝo 1: D-ro Mario A. Agrait-Marty: ŝtato devas esti PR, ne *PE
- Paĝo 1: Margaret L. Barkley: Telefono devas esti (415) 928-3126.
- Paĝo 3: *Jozefo Del Pino devas esti Jozefo kaj Nelly Delpino.
- Paĝo 6: *F-ino Audrey Janisen devas esti S-ino Audrey Janisen. Ŝia adreso
estas: 1998 Pacific Ave. #202.
- Paĝo 8: Robert A. Lifer: *Frederickstown devas esti Fredericktown.
- Aldonu: N. Z. Maimon
87 Maynard St.
San Francisco, CA 94112
- Paĝo 10: G. T. Ratzloff: *Martinex devas esti Martinez.
- Paĝo 11: S-ino Catherine Schulze: *(415) 342-7196 devas esti (415) 342-1796.
S-ino Mary C. Sears: *(415) 328-5899 devas esti (415) 856-0371.
- Paĝo 12: S-ino Elizabeth Stafford estas dumviva membro de ELNA.
- Paĝo 17: Sub la rubriko "ELNA-anoj ekster USONO": bv aldoni



Hongkongo
Brink

Sub la rubriko "Komisiitoj de ELNA": bv aldoni

Redaktoro de la Newsletter
Catherine Schulze

N.B.: La steleto (*) indikas, ke la apuda substrekitaĵo estas erara.

The asterisk (*) indicates that the accompanying underlined word,
name, number, etc., is in error.



FOREIGN VISITORS TO ELNA CONVENTION

Bill Harmon with Halina Szapatos (Poland)

Janusz G. Wolak (Poland)

Riszry Szardbalski (center) (Poland)
Bill Dickerman, Houston; Maria Zacherl

1980 TARIFF FOR UEA

Member - Yearbook (MJ)	\$11.20
Member - Subscriber (MA)	28.00
Societo Zamenhof (additional)	56.00
Subscription only to <i>Esperanto</i>	16.80
Subscription only to <i>Kontakto</i>	8.40
Life Membership in UEA	700.00
UN Kaj NI	5.60
<i>Esperanto Documents</i> (English or Esperanto)	14.00

UEA Memberships or subscriptions may be sent either to ELNA, Box 1129, El Cerrito CA 94530, or to UEA Chief Delegate for USA Bonnie Helmuth, Box 2615, La Jolla CA 92038. Payment made to ELNA may be combined with book orders or ELNA memberships for your convenience.

NEKROLOGO

S-ro Robert Schmitt, membro de ELNA, UEA, kaj Esperanto-Societo de Florida, mortis en Clearwater, FL 26an de majo. La plej aĝa membro de la Florida Societo (93-jara!), S-ro Schmitt lernis Esperanton en 1910 kiam li studis desegnadon en Boston. Multifacete talenta, li estis skulptisto, glisisto kaj flutisto. Post emeritiĝo li tradukis Esperanten plurajn misterajn kaj detektivajn novelojn. Pro lia sprito kaj bonhumuro la Florida Societo sincere sentas lian forpason.

ANNOUNCEMENTS

Bona Espero, Alta Paraiso, Goiás CEP 77260, Brazil - children 5-15 years old are learning Esperanto. They can use used children's Esperanto magazines and story books. Martha Evans writes that everyone does chores around the ranch which is 100 miles north of Brasilia. The directors are Joseph and Ursula Grattapaglia, formerly of Torino, Italy.

UEA COLLECTION OF COMMEMORATIVE STAMPS provides significant income, up to \$2,000 yearly. U.S. commemoratives are especially welcome. Do not soak off the stamps, simply trim around them. Send directly to: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam3002, Netherlands.

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA – BOX 1129, EL CERRITO, CA 94530

Enclosed is \$_____ for new renewal membership in ELNA for the year 1980.

NAME _____ Name and address of each new member published in *ELNA Newsletter* and next edition of the *ELNA Adresaro* unless member indicates otherwise.

ADDRESS _____

CITY, STATE, ZIP _____

Check correct category: Regular (\$18) Family (\$27) Youth (18 or under) (\$7.50)
Student (fulltime, 25 or under) (\$7.50) Senior (renewal only, 65 or over) (\$10.00) Life (\$360)
 (Note: Life membership payment received before Dec. 31, 1979 will be accepted at old rate of \$300.)

DATE OF BIRTH (If applying for Youth, Student, or Senior Membership) _____

Telephone Number: Area Code [] _____ Radio Call Sign _____
 May we publish your telephone number in the *ELNA Adresaro*? _____ May we publish your address? _____

WELCOME TO NEW ELNA MEMBERS!

Helmut J. Anderson	Rock Springs WY
S-ro Fumio Asano	Matsudo City, Chiba-ken, Japan
Steve Avey	Montrose CA
Peter J. Benson	Marriottsville MD
Ernest Black	Saugerties NY
Dr. Robert W. Blair	Provo UT
Michael Bruwer	Stoughton WI
Harry L. Cannon	FPO San Francisco
*Dianto Chomette	Squaw Valley CA
*Lilio Chomette	W. Hollywood CA
Royce Derby	Fennville MI
Karen L. Dickerson	Decatur GA
Jim Dombrowski	New Orleans LA
Bruce Freedberg	Park Ridge NJ
John Gelski	Lakewood OH
Rev. Bunlu Guiedtahtree	Thailand
Cynthia Harnett	Casper WY
Norman H. Jacobson	Seattle WA
James Williams Mersereau	Chevy Chase MD
A. A. Milani	Roseville MN
Gertrude Novak, M.D.	Chicago IL
Victor Palermo	Ridgewood NY
Thomas Raskin	Old Bridge NJ
Donald B. Sharp, SJ	Spokane WA
Robert Smales	Bermuda
John M. Smith	Lancaster CA
Roland Spickerman	Belmont CA
Michael Taglieri	Groveland MA
Mark B. Weddell	Indian Rocks Beach FL
Rondi Werner	Ventura CA
Mary Lucile Whitbeck	Bradenton FL
Lucille E. Whitehurst	Riverside CA
Charles Williams	Dayton OH
David Wolff	Rutland MA

* - Life member

NOTE NEW ELNA DUES FOR 1980

Individual Member	\$18.00
Family membership	27.00
Youth member (under 18 yrs)	7.50
Student member (under 25 yrs)	7.50
Senior member (65 or over)	10.00
Life Membership	360.00

NOTE: Until December 31, 1979, Life Membership may be purchased for only \$300. Take advantage of this!

SUBSCRIPTION RATE FOR HEROLDO

For the year 1980:

1-year subscription via surface mail	\$15.00
1-year subscription via airmail	18.00

HEROLDO subscriptions should be sent to ELNA Central Office.

ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

Abonprezoj:

por 1 jaro	\$3.00
por 2 jaroj	\$4.50
por 3 jaroj	\$6.00

KLUBOJ! Varbu amase abonojn aŭ reabonojn al *El Popola Ĉinio* inter viaj klubanoj, kaj rekompense ricevu el Ĉinio memoraĵon kun ĉina stilo!

Sendu abonojn al la loka peranto:

ELNA Centra Oficejo
Box 1129
El Cerrito, CA 94530

Generala Distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno kaj Abonvarbilo Senpage Akirebla Laŭpete

Esperanto League for North America

P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530
Usono/USA



Nonprofit Organization U.S. POSTAGE PAID Berkeley, CA Permit No. 330

NEWS - PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed